PRINCETON UNIVERSITY
APR 20 1922

FAMA FAMA

# AMERIKA ESPERANTISTO



## APR., 1922

OFFICIAL ORGAN
*of*
THE ESPERANTO ASSOCIATION
*of*
NORTH AMERICA

Digitized by Google

# AMERIKA ESPERANTISTO

**OFFICIAL ORGAN of**

## The Esperanto Association of North America, Inc.

**a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.**

**Yearly Memberships: Regular $1.00: Contributing $3.00: Sustaining $10.00; Life Members $100.**

**CO-EDITORS: NORMAN W. FROST H. M. SCOTT MRS. I. M. HORN**


## CLUB DIRECTORY

**This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.**

**Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary. Group Charter—$1.00.**

**BERKELEY, CALIF.**
Berkeleya Esperanta Rondo.—Vinton Smith, Secy., 586 Lake Park Ave., Oakland, Calif.

**OAKLAND, CALIF.**
Oakland Esperanta-Rondo.—L. D. Stockton, Secretary, 420 15th St.

**SAN FRANCISCO, CALIF.**
San Francisco Esperanto Rondo.—Meets 2nd Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall.
Esperanto Association of California, Inc.—Meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secretary, 946 Central Ave.

**MONTREAL, CANADA.**
Montreal Esperanto Association.—Meets each Monday evening at 8 in Room 12, The Tooke Bldg. Sec., Miss E. Strachan.
Esperanto meetings every Saturday evening at 8, at 20 Selkirk Ave., ALL are welcome.

**TORONTO, CANADA.**
The Toronto Esperanto Club.—Meets every Saturday at 7 P. M., at the Friends' Meeting House, cor. Maitland & Jarvis Sts. Sec., E. M. Gundy, 173 Spadina Road.

**WASHINGTON, D. C.**
La Kabea Esperanto Klubo.—Meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thomson School, XIIth and L Sts., N. W. Sin turnu al B. P. M., 1918 Sunderland Place.
Kolumbia Esperanto Asocio.—Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. M. every Wednesday, same address.

**CHICAGO, ILLS.**
La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park.—Jaroslav Sobehrad, Secretary, 5625 23rd Rd., Cicero, Ill.
La Esperanto Oficejo, 1669 Blue Island Ave.—Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate.

**ROCKFORD, ILLS.**
Scandinavian Esperanto Institute, 1217 7th Ave.

**BOSTON, MASS.**
Boston Esperanto Society, 507 Pierce Bldg., Copley Sq.—Meets Tuesdays, 7 P. M. M. Marootian, Secretary.

**WORCESTER, MASS.**
Worcester County Esperanto Society.—Business Institute, every Friday, 8 P. M.

**PORTLAND, ME.**
Portland Esperanto Society.—Mrs. E. C. Flint, Secretary, 16 Sherman St.

**DETROIT, MICH.**
Detroit Esperanto Office, 607 Breitmeyer Bldg.—Open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A. M.-9 P. M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P. M.
La Pola Esperanto Asocio, 1507 E. Canfield Ave.—B. Lendo, Sek., 3596 29th St.

**HEBRON, NEBRASKA.**
La Hebrono Grupo kunvenas ĉiun ĵaŭdon, 8 P. M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimanĉon, 10 A. M., 500 Olive Ave.—Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

**HOBOKEN, N. J.**
"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y."Meets every Tuesday at 8.30 P. M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome.—Pres., Mrs. M. O. Haugland; Secy., Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

**NEW YORK CITY, N. Y.**
The New York Esperanto Society.—Miss L. F. Stoeppler, Sec., 105 West 94th St. The Barĉo, or Esperanto Supper, is held on the fourth Sunday of each month, 6.45 P. M. at Hotel Endicott, 81st St. and Columbus Ave.
La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimanĉon, ĉe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

**CLEVELAND, OHIO.**
La Zamenhofa Klubo.—S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

**ERIE, PA.**
La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, inĝ., St. John Kanty College eldonas ½-jaran jurnalon, "La Studento," jara abono $1.00.

**PHILADELPHIA, PA.**
Philadelphia Esperanto Society.—Headquarters 133 N. 13th St.
Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.
Esperanto Stelo de Polujo.—Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507 N. York Ave.

**PITTSBURGH, PA.**
Esperanto Sec., Academy of Science and Art.—J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

**MILWAUKEE, WISC.**
Hesperus Esperantists.—S-ino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Ave., 3rd Tuesdays, 8 P. M.

Digitized by Google

# Amerika Esperantisto

## American Esperantist

CAMBRIDGE 38, MASS.

**Subscriptions, etc. to Boston Office, redakcia adreso, 12 Ash St. Pl., Cambridge 38, Mass.**

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

**One Dollar a Year. Single Number 10 Cents.**
**Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.**

**Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.**

**Published Monthly by**

**THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA**

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 29. April, 1922. No. 5.

## ESPERANTISM AND AMERICANIZATION

It is hardly necessary, nowadays, to tell Esperantists the story of Dr. Zamenhof, the creator of Esperanto. In fact that story has been so well told in Privat's loving biography that the rest of us can only take therefrom, or add a sidelight or two. Behold a boy, weak, retiring, the butt of those who should have been his playmates, but dreaming the dream of world brotherhood. Even as the boy gang drove him from them, so too, an urge from within drove him apart ever more and more to wrestle with a problem; to devote himself in an effort to solve the problem of life, not for himself, but for all men. This, too, in surroundings of pressing material poverty all his life; tho, not of spiritual poverty—courtly honors were in time to be laid before him unsought, and love and honor from all the increasing multitudes that learned and used his creation—and partook somewhat of the thoughts he had put into it—were to bring "the majstro" in time a reward few can hope to so merit and to so receive.

His labors in creating Esperanto were not of sudden inspiration of genius, but of careful, arduous study to eliminate and avoid imperfections. Thanks to his dire poverty and the unresponsiveness of his surroundings, he had long years to perfect the instrument, ere he could find money for the first publication. What he had tested out by himself and then presented to the world was a **consistent** whole, **not** a series of compromises between a number of scientific theories. It was not intended primarily, if at all, for the intercourse of the

Digitized by Google

learned; it was adapted as an implement for the common people. It had a definite aim behind it, never lost to sight, the harmony of the world's people one and all.

Russia, where Esperanto first spread, was alive to this striving for the good of mankind. The movement "V Narod," had filled all the schools with ideals of uplifting the masses. Paris never had much sympathy with this aim to benefit the common herd. There an elite of intellectuals grasped the new instrument, and proceeded to try to run it after their own cultured standards. Esperanto was thoroly advertised, the "interna ideo" glossed over. The nationalism of France was extreme; perhaps, as Dr. Steche points out*, political-racial tendencies were at the basis of the "Delegation's" attempt to dictate changes in the year 1908; to rule or ruin Esperanto. Those were bitter days to Dr. Zamenhof, days of anxiety and uncertainty, days of heavy responsibility, ere the way grew clear—"Ni Fosu Nian Sulkon!" Yes, and ever towards the aim sought. Practically all those who staid with Esperanto and who have now put it back into its former state of promise, have been more or less infected with this ideal of world unity thru uniting the peoples en masse; even tho, in offering Esperanto to specific classes, we offer it to be judged only on the score of its use to them in the present world.

Not all of us Esperantists will be willing to follow Dr. Zamenhof to the full ideal presented by the following clipping from Sennacieca Revuo (No. 22-3), but it is idle to hide its fundamental influence upon Esperanto and Esperantism. The extract is from a reply by the majstro when asked to take part in a convention to found a League of Hebrews:

"I regret that I myself must stand aside from this matter, for in my convictions I am a member of mankind ("homarano"), and I can not league myself with the aims and ideals of a special race or religion. I am profoundly convinced that all nationalism holds for humanity only the greatest unhappiness, and that the aim of all men should be to create a harmonious mankind. It is true that the nationalism of oppressed peoples—as a natural defensive reaction—is much more pardonable than the nationalism of the oppressing races; but if the nationalism of the strong is ignoble, the nationalism of the weak is imprudent; the two bring into being and sustain one another, and present a vicious circle of woes, from which mankind will never issue, save as each one of us shall offer up his group selflove and strive to take a stand on ground wholly neutral.

"This is the reason why I, despite the heartrending sufferings of my race, am unwilling to league myself with Hebrew nationalism, but wish to work only for absolute justice between man and man. I am profoundly convinced that thus I shall bring my unfortunate race much more of good, than by nationalist aims."

But "nationalism," that is patriotism! Yes, for many who still limit their "fatherland" to the bounds of nation or language. Once

*Entwicklungsgang der Weltsprache, pp. 13 and 14.

Digitized by Google

patriotism was a matter of the family; in the Middle Ages one was loyal to his village; later to the duchy; in Modern Times to the kingdom or state. Family feuds and intervillage warfare are obsolete; interprovincial wars have nearly ceased; international wars not yet. When our patriotism, our loyalty, embraces the whole world, what then? A War between Worlds?—let's leave Mr. Wells to speculate about that.

In this country we lately meet a propaganda termed "Americanization." To the extent that this means welcoming the stranger among us and broadening his and our horizon, it commands our hearty sympathy; but in its perfortive aspects, by law or breach of law, it looks vain and threatening. "Americanization" is of course an imported, not an American project; is akin to the Magyarization of the Slavs, the Russification of the Poles and Finns, or the Turkicization of the Armenians. Perhaps before we go too far, we might learn something from comparing the results obtained by these methods abroad, with the results attained by the former optional absorption here.

Whether or no we are subjects for Americanization or normalization, we, as Esperantists, must in some cases run counter to the process. Esperanto is not English; as Esperantists, we are not dreaming of American dominance over the world, nor of the extinction of the Spanish tongue in our Southwest, French along the St. Lawrence, or any national language anywhere. We are not opposed to international unions or international associations as such. We are even proposing one form of international association—that of language. Some of us have stretched our "patriotism" until what happens in China and Russia and Asia Minor **strikes home** to us; until we wish to be able not only to be not fighting with the rest of the world, but to be working along with all our fellow-mortals on this planet for our mutual advantage. That's the purpose that has made Esperanto impossible to eradicate whether by attack or neglect. It's a fifteenth point, Esperantism, or, as Dr. Zamenhof called it, "homaranism."

—Prujno.

---

La Moviĝanta Statuo.—Ŝipo eniris la havenon de Nov-Jorko, kaj ankris apud la Statuo de Libereco, laŭ dekstra flanko. Dum la nokto la tajdo turnis la ŝipon, kaj matenon la statuo estis laŭ maldekstra flanko de la ŝipo. Nova ŝipano ne komprenis la ŝanĝon de direkto, kaj fine demandis iun pri ĝi. La problemo estis jene klarigata: Nov-Jorko kaj Brooklyn ambaŭ pretendas la posedaĵon de la statuo, kaj tial la Registaro ĝin movas tagon post tago apud unu aŭ alian urbon.

—American Legion Weekly.

---

Frenezeco ŝirmas kontraŭ pli ol unu peko.—La Lorda Ĉambro proponas ke frenezeco estu kialo por eksedzeco. Ĝis nun ĝi estis rekonata nur kiel kialo por edzeco.

—London Opinion.

Digitized by Google

## XIV UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

**En Helsinki, Helsingfors, Finnlando, la 6—12 aŭgusto 1922**

KVARA KOMUNIKO (Mallongigita)

1. **La kongresa kotizo** (diskuto kaj klarigo).
3. **Pasportaj aferoj** (Finlanda vizo malmultekosta).
4. **Postkongresoj.** Stockholmo 15.—16. aŭg.; Kopenhago 18.-19. aŭg.
5. **Karavanestroj.**
7. **Fakaj kunsidoj.**

**Blinduloj.** F. Blindul-Asocio; sin turnu al S-ro R. Bergh, Gengatan 3, Helsinki.

**Teozofoj:** Teozofia Societo de F.; sin turnu al S-ino E. K. Koponen-Kostiainen, Vaasank. 3, D99, Helsinki.

**Sportistoj:** Laborista Sportligo, adr. Elaintarhantie 1, Helsinki.

8. **Presaĵoj** kaj afiŝoj pretaj.
9. **Kontoro.** ĉe Korkeavuorenkatu 17 A, tel. 113-40.
10. **Monsendo.** Pagu per papermono aŭ bankaj ĉekoj en via nacia valuto kaj pagota en vialanda ĉefurbo al L.K.K. Ĉi tio koncernas same la kotizojn kiel la sumojn kiujn vi sendas je via propra konto.

KVINA KOMUNIKO (Mallongigita)

1. **Ekskursoj en Finnlando. Antaŭ la kongreso.** Pro naturaj kaŭzoj estas multe pli rekomendinde fari rondvojaĝon en Finnlando antaŭ la kongreso ol post ĝi. Multaj kongresanoj alvenos antaŭvideble vendrede antaŭ la kongreso. Al ili estos aranĝata komuna ekskurso al **Tampere** kun la ĉirkaŭantaj lagregionoj. Ĉi tiu vojaĝo donas sufiĉe karakterizajn vidaĵojn al la Finnlanda pejzaĝo, daŭras nur ĉ. du diurnojn (tagnoktojn) kaj la vojaĝkostoj estas en II kl. 130 mk. kaj en III kl. 90 mk.

(La 5a komuniko detalas kun prezoj multajn interesajn ekskursojn).

4. **Fakaj kunsidoj. Pacifistoj:** La Finnlanda Pacifista Ligo invitas ĉiulandajn pacifistojn al faka kunsido. Sin turni al s-ro A. Selinheimo. Konstantininkatu 25, Helsinki.
5. **Aliĝo.** La LKK konsideris la aferon koncerne karavanoj kun ne-esperantistaj partoprenantoj kaj faris la jenajn decidojn por kontentigi ĉies dezirojn:

   a. kiel kongresanoj estas enskribataj nur esperantistoj;

   b. la ne-esperantistaj karavananoj aliĝu kiel **helpkongresanoj** por ricevi la permeson uzi la rabatojn donotajn al la kongresanoj, por partopreni en la festaranĝoj, viziti muzeojn ktp. laŭ samaj kondiĉoj kiel la kongresanoj.

6. La ĝisnunaj aliĝintoj estas el sekvantaj landoj:

   Germanio 28, Pollando 16, Estonio 14, Britlando kaj Holando po 12, Ĉekoslovakio 9, Franclando kaj Aŭstrio po 7, Hungario 5, Svislando 3, Litovio 2, Svedlando, Hispanio, Usono, Turkio, Kanado, Japanlando kaj Italio po 1, Finnlando 73, **entute 195 aliĝintoj el 19 landoj.**

7. **Helpkongresanoj:** 6 personoj aliĝis kiel helpkongresanoj.

Digitized by Google

9. **Blindula kaso.** La LKK danke notas la jenajn donacojn por la eldona kaso de la blindaj esperantistoj: **entute 396:69 Fmk.**
10. **Donacoj.** La LKK danke notas la jenajn donacojn: **entute 6.291:61 Fmk.**

**La Loka Kongresa Komitato.**

Adreso: Poŝta (ankaŭ por monsendoj): XIV Kongreso de Esperanto, Helsinki, Finnlando. Telegrafa: Esperanto, Helsingfors.

---

## KRONIKO ENLANDA

**Leesville, La.**—Je la Llano Cooperative Colony 7 gejunuloj aliĝis al U. E. A. Junularo, kaj F-ino Vinita Thurman estas delegito.
**Greenwich, N. Y.**—Pastro L. W. Cronkhite, longatempe misiisto en Bassien, Burmio, revenos Usonen ĉirkaŭ jun. 1.
**El Centro, Calif.**—D-ro Van Becelaere, 590 Olive St., fariĝis delegito de T.E.K.A. por Usono.
**Boston, Mass.**—La progresinta klaso de D-ro Lowell, L.K., nuntempe rapide progresas en parolado kaj legado. Vizitis Boston kaj Cambridge, S-ro Pellett el Brattleboro, Vt., kiu, gvidata de U.E.A. delegito, vizitis la muzeojn por kolekti faktojn pri sia liter-signifa teorio. Kelkaj eks-"virtuloj" kune vizitas restoraciojn diverslingvajn de Bostono. Ges-roj Malouf akceptos la klubanojn ĉe si en Arlington le 8an de Aprilo. Ĉirkaŭurbanoj rememoru nian barĉon Aprilon la 29an ĉe la klubo. Oni diskutos gravajn temojn, inter kiuj propagandon ĉe la N. E. A. kunveno. Ĉiuj bonvenaj!
**Palo Alto, Cal.**—Malgranda klaso komencas ĉe M. S. A., 915 Channing Ave.
**New York, N. Y.**—Regula monata barĉo de Harmonio okazis la 11an de marto; partoprenis 72 ĉetabluloj kaj 30 poste alvenintoj. Komencis la programon pianludo de s-ano f-ino Ethel Spector, kiun oni aplaŭdegis. Post tio s-ino D. Humbert kantis modernan skotan kanton kaj pro aplaŭdo aldonis kanton en Esperanto: "Rozo en herbejo," tradukaĵo el la germana. Poste sek. de la Harmonio Klaĝin salutis la alvenintaron kaj prezentis la aŭdotojn de tiu plej multnombre vizitata barĉo dum 1922. Unue li elvokis s-ron Platon Brunoff, dankante al li por lia lasta vizito same kiel por la nuna, petante lin, ke li ankaŭ lernu nian lingvon. S-ro Brunoff surprizis la societon per legado de sia propra rakonto, "A Convention of Animals," kiu estis tre oportuna kaj multe ŝatata. Post li S-ro Reich deklamis du proprajn poemojn, faritajn en la Esperanta lingvo por sia fileto, kaj aplaŭdego respondis. Post tio rakontis S-ro Carter anekdoton, "Bigamio," kiu ege amuzis la ĉeestantaron. Ree S-ro Brunoff estis vokita por kanti kaj kompleze ludis kaj kantis siajn proprajn kompoziciojn, "Spiritistic Message of Grieg," "March: Happiness," kaj "I do," al konstante plilongdaŭraj kaj fortegaj aplaŭdoj. S-ro Klaĝin, dankinte al la novjorka gazetaro, kiu raportis pri la barĉo, prezentis la ĉeestantan samideanon reprezentanton de la Evening Post, S-ron Sayers, kiu parolis angle kun kelkaj vortoj en Esperanto, kaj proponis, ke ĉiu amiko de

Digitized by Google

Esperanto en New York skribu ĉiun semajnon leteron al la preso, por ke tiu konvinkiĝu pri la neceseco de Esperanto.

Post li delegito de la Laborista Centro k-do Amiel paroladis pri la neceseco disvastigi Esperanton inter radikalaj rondoj. Li parolis Esperante kaj ricevis fortan aplaŭdon. Post li S-ro Silbernik kiel reprezentanto de U. E. A. parolis angle malsubtenante kelkajn vortojn de S-ro Sayers. Respondis al li S-ano Klaĝin kaj S-ro Sayers restarigante harmonion. Post tio multnombra Hudsonanaro havis sian vicon kaj por ili parolis S-ro Viedt en klara kaj belsona Esperanto. Ree vokita S-ro Brunhoff afable kantis ruse "Ej uĥnjem"; jude "Der Landlord," and ukraine "Visla baba." Sekve por la komitato de aranĝado F-ino Friedman parolis angle pri la neceseco aniĝi al la Harmonio, kaj S-ro Levkoff parolis tion Esperante. Rezultate oni varbis 20 geanojn. La danco daŭris ĝis la 2a, kiam ĥoro kantis "Gaudeamus igitur en Esperanto."

La proksima barĉo okazos la 8an de aprilo je la 8a vespere en la "Green Witch," 68 East 11th St. Ĉiu Esperantisto en New York ĉeestu; ju pli granda nia nombro en la regulaj barĉoj, des pli baldaŭ la gazetaro komencos regule raporti pri ni kaj favori nian movadon.

Raportas pri la barĉoj kaj pri Esperanto kelkaj gazetoj kaj plej ofte la New York Evening Post.

**Annapolis, Md.**—Ni rimarkis ke S-ano Rev. James L. Smiley ĵus gajnis premion de "The Arbitrator" por plej bona lia solvo de la strika problemo.

**St. Petersburg, Fla.**—Vizitis la Amikeco Esperanto Rondo marton la 15an F-ino Buek, S-anino el Brooklyn, N. Y.

**St. Andrews, Fla.**—La World Soshal Harmoniks Buro, Prof. Joso Lipes, direktor, anoncis feb. 14., Esperanto kurson en "dek lesonoj" por 20 sm.

## WORLD NEWS OF ESPERANTO

The Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio has appointed as delegate for Usonia Dr. Van Becelaere, 590 Olive St., El Centro, California. Doctors and druggists may become members of the association upon payment of at least 5 French francs.

An American missionary school in Alexandria, Egypt, is conducting a course in Esperanto.

The Milan government has given the Italian Esperanto Federation a subsidy of 1,000 lire. The mayor is a fervent Esperantist. Three cities have now officialized Esperanto teaching, Milan, Bologna, and Cremona.

The town library of Talinn, Esthonia, has bought Esperanto books to the value of 10,000 marks.

The Society for the Advancement of Culture of Semigalia, Latvia, has 35 Esperanto students in an Esperanto secton, also correspondence courses, and has just published an Esperanto-Latvian dictionary.

Digitized by Google

At Easter 1922 four public schools in Leipsig are to begin a two years Esperanto course in the 7th grade, 2 hours per week.

Rabaul, New Guinea, reports a small course for Chinese.

## ABOUT RUSSIA

Ruĝa Esperantisto speaks of the past year as one of discouragement in Russia after the brilliant successes of 1920. Sennacieca Revuo gives some facts (?). Some two years ago M. Valentinov, after an interview with Commissary of Public Enlightenment Lunaĉarski, wrote out the following in a report, "The government of R. S. F. S. R. permits the study of Esperanto officially on an equality with that of French, German, and English." Upon December 21, 1921, the Moskow Isvestiya gave the following notice about Esperanto. "The Head Popular (erare? Polit en S.R.) Enlightenment Department in answer to questions from various localities as to the instruction and study of the language Esperanto, explains that the supposition that Esperanto as the international language, is exclusively worthy of government attention, is premature. The Esperanto circles are private organizations and the existing Esperanto sections at the politklerigaj (public school) departments of several cities must be done away with."

This explanation is not yet wholly clarifying. Apparently in the spring of 1920 the Soviet leaders, in hopes of gaining worldwide support thru Esperanto, allowed Isvestiya to print an exaggerated account of their action concerning Esperanto. Later meeting with considerable Idist and other opposition they pigeonholed all action, tho allowing the recommendation to stand until Dec., 1921, when it became evident that there would be little wholehearted support of Sovietism. As Ruĝa Esperantisto complains, there are many Esperantist groups in Russia that contain no communists. In fact the present Esperanto activity in the Balkans has been largely instigated by the many thousands of Russian refugees.

The deofficialization of public school teaching of Esperanto is not an indication of hostility but only of shifting a burden. It is part of the program for a general revival of "bourgeois industry." The Esperantists are taking up their pre-war actvities with new vigor, no longer encumbered with the task of supporting the political regime abroad. Saĥarov has ready for press a Russian edition of Boirac's Vortaro and plans to start La Ondo again. He hs a large stock of valuable books; translations of Tolstoy and others, and would be glad to turn some into ready cash immediately. His address is Ulanskij per. 17, lg. 6., Moskow.

The yearly convention of the Chinese National Association of Teachers adopted a resolution at its last meeting that Esperanto should be made an obligatory subject in the schools.

**Fervojistoj.** The I. A. E. F. (Esperantist Railway Men) has been refounded and has much to do. All interested write to Georg Habellok, Breslau 10, Schleiermacherstr. 19, Germany.

Digitized by Google

Madrid has an Esperanto course in the Central Normal School.

In Helsingoer, Denmark, the Internacia Popola Universitato has put in a course of Esperanto.

In Belga Esperantisto (for Nov.-Dec., 1921) L. Cogen presents a new solution of the problem of better musical notation, and will publish further news of it thru B. E.

The following Fairs are using Esperanto to a greater or less degree in their correspondence, publications, and business dealings: Bordeaux, Lyons, Paris, France; Breslau, Frankfort, Leipzig, Regensburg, Germany; Praha, Bratislava, Chekoslovakia; Barcelona, Sabadell, Spain; Vienna, Austria; Basel, Switzerland; Malmoe, Sweden; Helsinki, Finnland; and Padua, Italy.

We are not quite sure how much some of the above are using Esperanto, how much 'working' the Esperantists.

---

## SVISA SPECIMENA FOIRO, ESPERANTO-FAKO

Gerbergasse 30, Basel, den 14. februaro, 1922.

Al la redakcio de "Amerika Esperantisto,"
Boston, Mass., Pierce Bldg., Copley Sq.

Estimata Sinjoro,

en interesa artikolo de via januara numero, ("The present state of Esperanto") vi parolas ankaŭ pri la uzado de Esperanto en la praktika vivo.

Ĉar via artikolo tute ne atentas la plej gravajn aferojn, tial permesu mallongan korekton kaj kompletigon.

Fakte ne nur estas sep, sed dekkvin specimenaj foiroj en Eŭropo kiuj uzadas Esperanton. Vi nur citas nome tiun de Leipzig, sed vi devas scii, ke la "Svisa Specimena Foiro" en Basel jam depost tri jaroj larĝe uzadas Esperanton kaj tre sukcese korespondas kun multaj firmoj kaj komercaj ĉambroj tra la tuta mondo.

Tion ni devis diri al vi pri nia foiro. Pri la aliaj punktoj, kiuj ne estas tute trafaj en via artikolo, eble informos vin la redaktisto de la "Internacia Komerca Revuo." Tiu gazeto estas ja la centra organo de la Esperanto komerca movado; ĝia prudenta agado forte helpas al la disvastigo de Esperanto ĉe komerco kaj industrio en tuta Eŭropo. Ke vi, en via artikolo, eĉ ne menciis tiun gravan revuon, estas, laŭ mi, nekomprenebla forgeso.

Petante, ke vi publikigu la sencon de nia letero en via ŝatata revuo, kaj ke vi menciu nian novan Esperantan prospekton, ni prezentas al Vi, estimata sinjoro, nian respektan saluton.

[Ni konfesas gravajn mankojn en la januara artikolo.

Ĉar la I. K. R. ne interŝanĝas kun A. E., ni tute ne povis atesti eĉ ĝian aktualan ekziston.

Ni dankas pro la informo ke ni ne estas troigantoj; bedaŭrinde via letero nesubskribita ne notas la nomojn de la 15 foiroj. Ni dankas pro la bela prospekto de la sesa Svisa Specimena Foiro (Apr. 22—Majo 2, de svisaj komercaĵoj), kaj volonte publikigas la informon:

N. W. Frost.

Digitized by Google

"La direkcio de la Svisa Specimena Foiro, en Basel 1, dum la tuta jaro volonte kaj **senpage** donas al ĉiuj interesuloj buŝajn aŭ skribajn informojn pri svisaj produktaĵoj kaj liverantoj. Esperanto korespondata."

## PRINTEMPO-FOIRO DE FRANKFURTO A. M.
### GAZET-INFORMOJ
**por disvastigo en kiel eble plej multaj tag-ĵurnaloj kaj fak-gazetoj.**

—

Ni sciiĝas el esperanto-prospekto, ke en la semajno de la 2-8 de aprilo 1922 oni arangôs la 6an Internacian Foiron de Frankfurto a M. Ĝis tiam estos finkonstrataj du pluaj foir-konstruaĵoj; impona ferkonstrukcio "La Domo de la Tekniko" kaj duetaĝa masiva konstruaĵo el betono "La Domo de la Ŝu-komercaĵoj." La Foira Komitato ne malfaciligis la superrigardeblon de iu el la laŭbranĉe ordigitaj sekcioj. Pro tio ĝi tamen devas limigi la nombron de la ekspoziciontoj, sed aliflanke povis fari pli zorgeman elekton inter la firmoj allasataj. La importisto trovos do en Frankfurto veran kvalito-foiron kun bonega resumo pri ĉio ofertata.

La aŭtuna foiro estos de la 8—14 de oktobro, 1922.

—

Por eventuale sendotaj pruv-ekzempleroj ni rekompencas la sendokostojn kaj elspezojn. Indiku legeble vian precizan adreson!

La Foira Direkcio de Frankfurto estas la unua, kiu en granda mezuro utiligis Esperanton por la tutmonda reklamo kaj aligis al si apartan esperanto-fakon. Tial ankaŭ nun ĝi esperas povi kalkuli pri akcelo per la esperanto-movado kaj petas bonvole atenti la gazetinformon de ĉi-tiu prospekto.

Kun alta estimo,

MESSAMT (Foir-Oficejo, Esperanto-fako, Rob. Kreuz.

## LA IIIa FOIRO EN PRAHA

La malfermo de la 3a foiro okazis la 1. sept., 1921, sub la honora protekto de l' prezidanto de ĉeĥoslovaka respubliko, Th. G. Masaryk.

La foiro pruvis, ke ĝi estas kapabla kunvenigi sufiĉe da seriozaj interesuloj por sia ekspozantaro. Inter la eksterlandaj vizitantoj estis reprezentataj preskaŭ ĉiuj eŭropaj landoj, plie Turka, Palestina, Japana, Amerika, kaj Nordafrika landoj, resp. kontinentoj. La nombro de ekspozantoj atingis 2.374, inter ili tie estis ankaŭ kelkaj el la landoj germana, aŭstra, franca, jugoslava, svisa, hispana, alĝera, angla, dana, Nederlando, kaj Ameriko. La spaco bezonita atingis 22.248,50 kv. m.

Negocoj estis faritaj por valoro de 1.040.451.950.—kĉ., sed pli vere la dumfoiraj negocoj ciferis je pli ol du miliardoj, ĉar la Foira Borso multokaze ne estis informata pri la vendoj. La plej gravajn negocojn atingis la elektroteĥnika kaj teksaĵa industrioj. Pli estis negocataj jenaj ĉefaj eksportaĵoj: peltaĵoj, maŝinoj, aŭtomobiloj, ledaĵoj, ledgalanteriaĵoj, nutraĵoj, likvoroj, ĉokoladoj, marmeladoj, kera-

Digitized by Google

mikoj, vitraĵoj, artikoloj de Jablonec, sportartikoloj, ludaĵoj, muzikinstrumentoj, ktp. Entute oni povas konstati, ke la foiro estis sukcesplena en komercoj tiel eksterlanda kiel en-landa.

La lasta foiro montris plene internacian karakteron, tiufoje akcentitan per Esperantismo, ĉar ne sole Esperantaj flagoj salutis malsupren de l' ĉefa ekspozicieja portalarko, sed ankaŭ interne de la oficiala pavilono kaj inter la standoj troviĝis kelkaj Esperantaj informejoj. Sendube la peresperanta propagando de l' foiroj prosperige influos la historion de l' Esperantismo, enpenetrigonta la utiligon de Esperanto en la komerca korespondado.

4a Foiro okazos 12—19, marto, 1922; 5a Foiro, 3—10 septembro.

Por propagandi tiujn venontajn foirojn, la foira oficejo dissendas afiŝojn kaj broŝurojn en Esperanto, kaj elirigas ankaŭ Esperantan bultenon.

## EDITORIAL MEDITATIONS

The cover design and cut are the work and the gift of our talented Boston samideano, S-ro Marootian.

We intended to have our picture of the Hancock Club on the inner front cover but directions got twisted at the printer's. It was a dandy picture, what club comes next?

We would appreciate some good short stories, not because we will **probably** print them, but in order to use if need arises. If you want editor's comments (marked on copy sent) say so and enclose stamped envelope for return.

We are getting rather overstocked with recenzaĵoj; are looking about for an expert, punctual, and concise volunteer reviewer.

## A WORD OF EXPLANATION

We note today three Esperanto Catholic reviews. With regard to the present state of Catholic opinion, still divided tho no longer in acrimonious hostilities, we feel that it is only fair to state publicly what we are saying privately. We have known of I. K. U. E. for many years and admired the notable studies in Espero Katolika; we regret its late excursions into polemics. There is so much else to do! We came in touch with the Graz, Austria, movement thru Blanka Kruco, a small society organ issued largely in German. The movement, however laudable, was never solely for Esperantist ends; for example, we understand that Esperantists' money, solicited to send Esperanto-speaking children from Austria to Spain, did not bring to the Spanish hosts the Esperanto conversation expected. Also we understand that the congress of Ika in Graz was not solely conducted in Esperanto, but merely permitted the use of Esperanto. With the aims and objects of the Ika organization non-Catholics have therefore nothing to do other than to thank it for and record its use of Esperanto. The use of our Parolejo Department is open but during polemics we felt it necessary to withhold that department from both parties. If our statements above are in error please inform us, in order that we may not repeat them. N. W. Frost.

Digitized by Google

## ANNOUNCEMENT BY EXECUTIVE COMMITTEE

As foreshadowed in the last issue of this magazine, the Toronto Congress will be held July 12-16. The slight uncertainty which prevailed last month has been entirely removed; and members may now plan to be present without fear that the dates will be changed. The Toronto Esperantists are full of enthusiasm, and eager to welcome as many samideanoj as possible. Future issues of Amerika Eperantisto will give details of the plans now under way. There is no reason why this should not be a record-breaking occasion, which none will wish to have missed. Toronto is an exceptionally beautiful and interesting city; and the delegates will see and enjoy much that is novel. A post-Congress excursion through the Thousand Islands of the St. Lawrence to Montreal and Quebec is already being talked of. It will be easy for most American attendants at the Congress to visit Niagara Falls on the way to Toronto, and thus enjoy one of the supreme marvels of the continent. Rarely has a Congress city been chosen in connection with which so delightful a vacation trip may be planned. There will be serious business to be considered, calling for the best thought of all loyal Esperantists; but the strain will be relieved in no small measure by the many events arranged for the entertainment of all who come. Begin to plan now!

James F. Morton, Jr.,
Chairman of the Executive Committee.

---

## PRESS MENTION

New York Evening Post—Brazil Announces Her Centenary in Esperanto.

ditto —To Show Portuguese Art, referring to samideano Ramos' business trip without knowledge of English.

ditto Jan. 21—Free Classes in Esperanto.

ditto , Feb. 24—Science and a Common Language, an editorial.

ditto , March 17—Merits of Esperanto.

Wahkon (Minnesota) Enterprise, Feb. 23—Letero de Anglolando, answering which the editor concludes that Esperanto, tho we formerly regarded it as a fad, "is an established language, and a knowledge of it is of more value than that of any other beside our own."

St. Petersburg (Fla.) Times, March 2—Interesting Meeting of Esperanto Rondo.

ditto , March 16—Same title.

St. Petersburg (Fla.) Independent, March 9—Esperanto Circle Meets. (We must congratulate the St. Petersburg samideanoj on their excellent publicity and their system in keeping in touch therewith.)

The Magazine of the Children of the Kingdom quarterly contains a short Esperanto selection in each issue.

Digitized by Google

The American Cooperator continues both lessons and a page of Esperanto news. It is a valuable aid to us as it reaches all parts of the country.

Thanks to the approaching consideration of Esperanto by the League of Nations and by the scientific bodies of this country, we are receiving a marked increase of press mention. We suggest that propagandists get articles ready or furbish up their old rejects, and try a few of the Sunday newspapers, who are probably on the lookout for just such material today. The Helsinki congress committee is ready to provide cuts for illustrated articles on our 14th world congress, so there is an opportunity to reach the public quite unexampled.

---

**PAROLEJO**

**En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj**
**In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required**

**(The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head; the facts are on the authority of the person signing. NOT open for any articles upon Esperanto subjects proper.)**

"JOSEFO RHODES MEMORAĴO"

Jorkŝira Esperantista Federacio petas vian helpon:—

1e, per interesaj informoj rilate al S-ro Rhodes de tiuj, kiuj laboris kun li kaj intime lin konis (precipe dum la fruaj jaroj de nia movado).

2e, per mondonacoj al la eldona kaso.

3e, per antaŭ-mendoj de la libro, kiu estos eldonota je nur modera prezo, kaj kiu fariĝos konstanta memoraĵo de tre nobla, vigla kaj sindonema samideano.

Sincere via,
James H. Fitton,
Meadow House, Shepley, England.

---

**Esperantista Centra Oficejo**

La oficistaro de la Esp. Centra Oficejo konsistas nun el la solaj jenaj personoj, kiuj dediĉas tempon al la Oficejo, ekstere de siaj profesiaj okupoj:

S-roj Gabriel Chavet, ĝenerala sekretario de la K.K.K.; Barono F. de Menil, ĉefadministranto, kaj Leono Agourtine (ĝenerala propagando); F-inoj G. Gerard kaj Ch. Gaillot (administraj laboroj).

Por faciligi kaj rapidigi la laboron, oni bonvolu adresi ĉiujn sendaĵojn laŭ la jena maniero:

Esperantista Centra Oficejo, 51, Rue de Clichy, Paris-9e.

La monsendojn oni adresos al la persona nomo de S-ro F. de Menil, aŭ al lia poŝta ĉekkonto:

Paris 1er Arrondisement C. C. 8-60.

---

**Internacia laborkongreso katolika en Luxembourg**

La 31an de julio ĝis 3a de aŭgusto okazos en Luxembourg la 2a internacia laborkongreso katolika. Ĉiulandaj samideanoj katolikaj kore estas invitataj. Detalajn informojn donos la nacia direktoro de

Digitized by Google

Ika, A. Vidikovski, 2833 Livingstone Str., Philadelphia, Pa., kaj Centra oficejo de Ika, Graz, Karmeliterpl., Aŭstrujo.

Dank' al nova poŝtinterkonsento, abono al Hispana Esperantisto estas $0.80, kaj abonanto ricevos tuj senpage kvar libretojn kaj aliajn dum jaro.

Inf. Kom. J. Mangada Rosenorn, Jaca, Huesca, Hispanujo.

---

## SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

**23 rue Boyer, Paris XX, Francio**

IIa KONGRESO, 12—16 aŭgusto, 1922, FRANKFURT a M. Germ.

**1a kaj 2a Komunikoj (mallongigitaj)**

La Kongreso okazos de 12 ĝis 16 de aŭgusto (samtempe kun la Internacia Sindikata Kongreso de la Ministoj) en la festhalo de la fama Restoracio, "Frankfurter Konzertgarten, Allesheiligen For. Ecke Langestrasse" meze de la urbo.

**Kongresadreso:** Kdo. Jean Roth, Rodelheimerlandstr. 131-III, Frankfurt a. M., Rodelh., (Germ.)

**Kongreskotizo:** (pagebla per naciaj monbiletoj aŭ ĉeko)—. .$.80.

**Aliĝo::** Valoraj estos nur la aliĝiloj akompanataj de la kotizo.

**Komunikoj:** Ĉiu No. de Sennacieca Revuo (organo de S. A. T.) publikigos unu detalan komunikon de la Kongreskomitato.

---

## THE LINGUIST

Ted Robinson, in Cleveland Plain Dealer

My father is a ling-gue-ist, I'll say so, he's a wiz!
I guess 't he c'n talk most all the languages they is.
He tells your preacher what he thinks of Hebrew Littrachoor,
An' when he meets a Frenchie, why he always says "Bon Joor!"
An' when the grocer says, "We gates?" Pa comes right back, "Gonts Goot!"
An' even to our maid (she's Scotch) he says, "Ye ken, na doot—!"
An' once that young Greek bootblack, he got through shinin' Pa,
An' when he says, "How do you like?" Pa answers him, "Kala!"
But when the Greek talks more, it doesn't seem like Pa understands,
An' if the Frenchman jabbers back, he just throws up his hands.
He always has to make our Janet say each sentence twicet,
An' when the grocer asks, "We feel?" he says, "Why, have 'em sliced."
He says these immigrants all talks a barb'rous dialect,
While he has learned the language right, so what do you expect?
He talks a dozen languages all right, Ma says, but when
It comes to understandin' 'em that's something else again.

* * * *

That's why we're going to learn to talk the Esperanto tongue
So we can understand it—spoken, written, read, or sung.

**Ĉu ne?**

Digitized by Google

## LUDO DE SONORILEGOJ

Vespere en la kora, dolora mono-
tono
Subite jen eksonas la sonorila
sono
Kun frapo tremanta,
Kun voĉo ĝemanta,
La batoj ekbruas,
fenestron ekskuas,
kaj milde ekfluas
Muĝado la sorĉa.

Ho, son' sonorila,
Vi tondrosimila
kaj tamen trankvila,
Ravanta kaj dolĉa!

Doloro de koro premanta, dron-
anta
Sufokas. Mi vokas al bronzo son-
anta:

Ho, svingu la langon,
Vi tondre batanta!
Ho, plend' via granda
Traringu la landon!
Ho, plendu la fonton
De l' sango, riproĉo!
Ho, tondru la voĉo
Kaj fendu la monton,
Estingu flamlangon
De l' sent' malamanta,
De l' blinde flamanta,
Volinta la sangon:
Atingu la kanto
La koran profundon
Por vindi la vundon
Sangintan pro vanto.
Ho, sorĉu la senton
Indulge lulante
Kaj larmojn rulante
Eksolvu la penton!
Ho, ringo de kantoj,
Vi fondu la rondon,
En rond' de amantoj!
Kor' brulas, voĉ' lulas, min levas.
mallevas,
Pri flamo de l' amo flagranta mi
revas
Ke ruĝaj flamlangoj
disflugas tra landoj,
ekruĝas la vangoj
En fratĉirkaŭpreno.
Kaj frate en rondo
solena, tra mondo
ekmuĝas la ondo
**De l' kant' pri kompreno!**

* * *

Sed, ho ve, tremante
Lastfoje ĝemante
Kun mortadanta muĝo forsonas
bronza tono
Kaj kaptas min denove dolora
monotono.

Dr. Kolomano Kalocsay.
El Esperanto Triumfonta

---

"Mi ne postulas pagon por ĉi-tiu poeziaĵo," diris la poeto al redaktisto, "mi ĝin oferas al vi kiel komplimenton."

"Vi estas tre afabla," diris la redaktisto, "permesu al mi redoni al vi la komplimenton."

---

En Parizo la gvidanto montris al Amerika turisto la tombon de Napoleono, kaj diris kun fiero, "Ĉi-tiu grandega sarkofago pezas kvardek tunojn. Interne de ĝi estas ŝtala ujo kiu pezas dekdu tunojn, kaj interne de tiu ujo estas plomba kesto, hermetike lutita, kiu pezas pli ol du tunojn, kaj interne de ĝi mahogana ĉerko, kiu enhavas la restaĵojn de la granda Napoleono."

Dum momento la amerikano estis silenta. Tiam li diris, "Ŝajnas al mi ke vi lin havas tute sendanĝere. Se li iam elŝtelos, sciigu min tuj telegrafe laŭ mia kosto."

Digitized by Google

## SCOUTS, TAKE THE TRAIL

### The Open Air, a Free Mind, and Esperanto

Some interesting changes have recently occurred among the officers of the Skolta Esperantista Ligo. Sub-Troupleader K. Graham Thomson, hitherto Chief Propagandist, has become foreign editor of the English monthly, "The Trail," and has been succeeded as head of propaganda by Sub-Troupleader J. W. Leslie, 507, Lea Bridge Rd., Leyton, London E 10, England. (The U. S. leader is Rev. John H. Fazel, 100 E. Sixth St., Topeka, Kans.)

In the past The Trail has printed articles from the pen of Mr. Thomson about Esperanto and S. E. L., and its editor is much interested in Esperanto and wishes if possible to back it.

The new Foreign Editor is choosing correspondents in many lands, most of whom are S. E. L. members, and these will report to him in Esperanto about the activities of their lands in scoutlore, athletics, open-air life, nature study, etc. Each month official news of the Esperanto movement and S. E. L. appears in Esperanto, and altho most of the journal is printed in English, it is extremely interesting to those attracted by the aforesaid themes.

Since the directors of The Trail have decided to back up Esperanto, I humbly suggest that samideanoj in turn back up the journal. The yearly subscription is but four shillings, payable to Eksterlanda Redaktoro, The Trail, Denison House, Vauxhall Bridge Rd., London, S. W. 1.

J. W. Leslie, Propaganda Fakestro de S. E. L.
[traduko]

---

### Laŭ Via Plaĉo

Sur branĉo de rozo jen akra pikilo;
Lilioj enloĝas en ŝlima argilo;
Kolor' papilia foriĝas ĉe vorto;
    Ĉe vojfino staras la domo de morto.
Ne, ne: sur la dorno la rozo montriĝas;
El ŝlimo rivera lilioj eliĝas;
Ol la papilio pli bela nenio;
    Ĉe vojfino staras la pordo al Dio!

De Edwin Markham, tradukis S-ro Key

---

Du kuracistoj estis operaciantaj je paciento pro apendicito. Post la kompletiĝo de la operacio, unu el la kuracistoj netrovis malgrandan spongon. Oni distranĉis la pacienton, trovis la sorbilon interne de li, kaj lin rekudris. Ĵus fininte tion, la alia kuracisto rimarkis la mankon de kudrilo. Ree oni malfermis la pacienton.

"Sinjoroj"—diris la viktimo, kiam ili la trian fojon estas lin refermontaj—"por ĉielo, se vi volas tion daŭrigi, bonvole meti sur min butonojn." El Boston Ideas, tradukis Prujno.

Digitized by Google

## LA KISO MORTINTA

**A. Negri** (Bicknell)

Printemp' malĝoja estis, sur la tero
  La herb' malkaŝis fruan violeton
Sed antaŭ ol ekflori, frosta horo
  Mortigis la floreton.
Por vi, en mia buŝo, en vespero
  Malĝoja, mia koro kison portis
Sed vi la kapon turnis, kaj sen floro
  Ve, mia kiso mortis.

el L' Esperanto 6-7, 1921.

---

Petro vizitis sian filon en Montrealo. Antaŭe li neniam estis en Montrealo, kaj la junulo montris al sia patro ĉiujn vidindaĵojn, kaj inter aliaj ili supreniris la monteton. Entuziasme la filo diris, "Rigardu, paĉjo, ne estas mirinde tie malsupre?" La patro diris, "Bone, filĉjo, sed se estas tiel mirinde tie malsupre, kial vi min trenigis ĉi-tien supren?" —Anonimulo.

---

La scienculo diris al la protoplasmo, "Estas granda abismo inter ni; ni figuras ekstremaĵojn: vi la komencon, kaj mi la finon." La protoplasmo respondis, palpebrumante per unu okulo, "Kaj kiam mi vin rigardas, amiko, mi bedaŭras ke mi komencis."—New York Evening Post.

---

Milionulo: "Diru al mi, filineto, ĉu via karegulo havas monon?"

Ŝi: "Monon, paĉjo, li ĵus donacis al mi diamantan ringon, ĉirkaŭitan de perloj!"

"Jes," diris la patro, "sed mi deziras scii ĉu li nun havas monon restantan." —London Weekly Telegraph.

---

Koresponda Lernejo—Vojaĝanta Vendisto: Kiu estas, laŭ via opinio, la plej lerta viro en ĉi-tiu vilaĝo?

Enloĝanto: La poŝtisto, li konas ses lingvojn.

Vojaĝanto: Ĉu li ilin lernis en la universitato?

Enloĝanto: Ne, li ilin lernis legante poŝtkartojn kiuj pasis tra la poŝtoficejo. —New York World.

---

Statement of the Ownership, Management, Circulation, Etc., required by the Act of Congress of August 24, 1912, of Amerika Esperantisto, published monthly at Boston, Mass., for April, 1922.

Publisher, The Esperanto Association of North America, Inc.

Editor, Norman W. Frost, 12 Ash St. Place, Cambridge 38, Mass.

Owners: The Esperanto Association of North America, Inc.; C. F. Bardorf, Pres., Montreal, Que, Canada; J. J. Sussmuth, Vice-Pres., Union Hill, N. J.; B. Pickman Mann, Treas., Washington, D. C.; G. W. Lee, Sec., Boston, Mass. No bonds or mortgages.

(Signed) Norman W. Frost, Editor.

Sworn to and subscribed before me this 10th day of April, 1922.

(Seal). Joseph B. Ross, Notary Public.

My commission expires October 7, 1927.

Digitized by Google